

INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro
Rio de Janeiro - RJ — CEP: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486
retpoŝta adreso: esperanto.kke@gmail.com ttt-paĝo: www.kke.org.br

Nº 59**9ª JARO (NOVA FAZO)****NOVEMBRO-DECEMBRO/2010****ĈI-NUMERE: PRELEGO DE ILMAR GOMES FERREIRA**

“Chorinho” la unua urba muziko en Brazilo

Legu ankaŭ: Ĉu vi parolas globish? (Paulo Sérgio Viana)

Eventos

- Set, 1** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Set, 3** - Palestra de Ilmar Gomes Ferreira sobre o tema "Historio de la Choro", La Unua Urba Muziko en Brazilo", com a presença de 13 pessoas.
- Set, 8** - Konversacia Klubo / Babilado kun Aloísio Sartorato.
- Set, 13** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Set, 15** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Set, 17** - Palestra de Álvaro Motta sobre o tema "La Vivo de Louis Braille", com a presença de 14 pessoas.
- Set, 19** - Um Domingo na Fazenda Esperanto.
- Set, 20** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Set, 22** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Set, 24** - Festa dos Aniversariantes com a presença de 10 pessoas.
- Set, 27** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Set, 29** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Out, 1** - Palestra de Givanildo Ramos Costa sobre o livro "Aidoso, Ege Trans la Doloro" - Kion mi lernis tradukante ĝin", com a presença de 15 pessoas.
- Out, 2** - Ago-Tago no Largo da Carioca.
- Out, 4** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Out, 6** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Out, 8** - Palestra de Osmar de Agostinho Filho sobre o tema "A Importância da Saúde Bucal", com a presença de 11 pessoas.
- Out, 13** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Out, 15** - Palestra de Célio Freitas Martins sobre o tema "La Ĉefaj Aspektoj de la Pola Lingvo", com a presença de 15 pessoas.
- Out, 16** - Passeio do Programa Conheça o Rio a Pé, no Largo de São Francisco, ciceroneado por Laura Pereira de Alcântara.
- Out, 18** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Out, 20** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Out, 22** - Palestra de Francisco Stefano Wechsler sobre o tema "Ĉu vi scias retmesaĝi?", com a presença de 15 pessoas.
- Out, 25** - Roda Literária / Coordenação de Jair Salles.
- Out, 27** - Clube de Conversação / Bate-papo com Aloísio Sartorato.
- Out, 29** - Festa dos Aniversariantes com a participação do Printempa E-o Grupo e a participação de 15 pessoas.

Doações para a Caixa Geral

Lindolfo Batista Grilo: R\$ 20,00; Ademir Vargas: R\$ 5,00; Cleber de Moraes Lemos: R\$ 340,00; Romeu Kozo Hatushika: R\$ 300,00; Almir Ferreira: R\$ 100,00; Givanildo Ramos Costa: R\$ 100,00; Álvaro Motta: R\$ 1.600,00; Rozana Caraméz: R\$ 35,00; Neide Barros Rêgo: R\$ 100,00. *Dankegon al ĉiuj!!!*

Campanha "Esperanto nas Bibliotecas"

Paulo José Mariz: R\$ 20,00; Magda Zago: R\$ 10,00. *Koran dankon!!*

Doações da Campanha Esperanto nas Bibliotecas

97. Biblioteca do Colégio Esperanto, São Paulo, SP.

Expediente

InKo, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 59, novembro-dezembro 2010.

Coordenação: Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

Redação: Aloísio Sartorato

Revisão: Célio F. Martins

LA PROFETECO DE ZAMENHOF KONFIRMIĜIS

Ĉiumomente mi surpriziĝas pro la profetaj diraĵoj starigitaj de la Iniciatoro de Esperanto, kiel Lazaro Ludoviko Zamenhof volis esti konata, de antaŭ preskaŭ du jarcentoj.

Estas de li ĉi tiuj estontaj certigoj, kiuj estas en lia verkita eseo "ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO INTERNACIA", legita de S-ro Louis de Beaufront, franclingve, en formo iom ŝanĝita kaj mallongigita en la kongreso de l'Association Française pour l'Avancement des Sciences, en Parizo, en la jaro 1900: TIAL SE ONI DIRAS AL VI "LA MONDO NE VOLAS VIAN LINGVON", RESPONDU KURAGE: "ĈU LA MONDO VOLAS AŬ NE VOLAS, ĜI PLI AŬ MALPLI FRUE DEVOS AKCEPTI ĜIN, ĈAR ALIE ESTI NE POVAS."

Tutcerte, tiu konkludo li starigis, mi kredas, pro lia vivanalizo, spertuminte multajn dolorigajn momentojn kaj periodojn, kiuj nur estas profitcelaj por homo, kiu ame konceptas la homaron kiel la Genio de Bialystok aŭ aliaj en similaj grandspiritaj kaj menskomprenaj niveloj, ĉar ĝenerale por homo kiu nuntempe vivas surtere, mi inter ili, la tendenco estas antaŭ malfacilaĵoj, plendi, ribeliĝi, Dion akuzi, ne profitante la instruojn de la kunvivlaboratorio, konsiderante ke nia amkoncepto ankoraŭ estas aparta, nekuna, multe pli memama.

Ne estis sensense, ke nia estiminda svisa samideano Edmond Privat, eble la plej ĉefa biografiisto de la Amanto de la Homaro, certigis en sia verko "Vivo de Zamenhof", jene: "Pri sia persono li estis ĉiam silentema. Liaj proksimumoj eĉ ne povus respondi. Ili vidis nur kiamaniere li vivis: bonkore, pure, modeste, helpeme, ofere, mirinde, pacience kun ĉiuj, neniam ofende per ago aŭ parolo kontraŭ iu ajn, ĉiam simpatie, aŭskulteme al ceteraj homoj, eĉ al tedaj. ...Al miloj da vivoj li donis ĝojon, sencon, utilon. Ne perfidi li volis, sed helpi. En tio li montriĝis siatempa."

Do homo tia, pro sia spirita dimensia kapableco nur disvolvas en sia eno iajn psikajn malkovrojn, kiuj povas eĉ antaŭvidi la estontecon, en tiu kazo, la sukceson de nia amata lingvo. Tiel mi komprenas la kialon de la supre menciita aserto de Zamenhof, kiam en la pasinta jarcento li kuraĝigas la tiamajn esperantistojn rilate al akcepto de Esperanto farita de la neesperantistoj.

Kiom da jaroj jam pasis kaj la profetaĵo farita de nia Iniciatoro konfirmiĝis.

Hodiaŭe, en kiom da landoj la Internacia Lingvo estas realaĵo!

En nia lando, ekzemple, kiel pligrandiĝas la nombro da personoj kiuj fariĝas esperantistoj!

Do, Zamenhof krom esti simbolo de amo, ankaŭ montras, ke, kunigante koron kaj menson en niaj realigoj nia profetdiraĵoj fariĝas realo same kiel li profetis rilate Esperanton.

FELIĈAN KRISTNASKON KUN JESUO, KAJ PROSPERAN NOVJARON ĈE DIO, NIA AMATA PATRO.

Givanildo Ramos Costa

“Chorinho” la unua urba muziko en Brazilo

Ilmar Gomes Ferreira



La "Choro" (Ŝoro), popole nomata "Chorinho", estas muzikstilo el la popola brazila muziko, kiu havas pli ol 130 jarojn. La muzikgrupoj, kiuj ĝin ludas estas nomataj regionalaj "regionais" kaj la muzikistoj, komponistoj aŭ instrumentistoj, estas nomataj ploristoj "Chorões". Spite de la nomo, tiu ritmo estas ĝenerale ĝoja kaj gaja, karakterizata per improvizado de la ludantoj. "Choro" estas muzikstilo tipe brazila kaj la plej antikva el ĉiuj aliaj brazilaj urbaj muzikoj.

La Ŝoro, estas, esence, muziko tute instrumentala. En la malmultaj Ŝoroj, kiuj havas verson, oni povas aserti, ke grandparte el ili, oni versigis multajn jarojn post ties aperigo de la "Ŝoro" aŭ post la morto de la aŭtoro (ekzemplo de sukcesa versigo estas "Carinhoso" de Pixinguinha). Oni povas historie diri, ke la "Ŝoro", ekaperis en la urbo Rio de Janeiro en la komenco de la 19-a jarcento, koincide kun la alveno en Brazilon de la portugala reĝa familio, kaj la ili akompanantaj 15 mil eŭropanoj. Kiel konsekvenco el tia fakto, la urbo Rio de Janeiro senprecedente transformiĝis rilate al la kulturo. Muzikistoj, muzikinstrumentistoj kaj novaj eŭropaj ritmoj alvenis al la urbo kaj estis tuj absorbitaj de la socio.

Ŝoro rezultigis el ludado de la eŭropaj muzikstiloj far de brazilaj muzikistoj, speciale la polko, kiu estis prezentita en la urbo en 1845. Tiam la afrikdevenaj ritmoj jam forte influis la muzikistojn, precipe la "Lundu" (el kiu naskiĝis la sambo), kiu jam estis en la brazila kulturo ekde la fino de la 18-a jarcento. La Ŝoro naskiĝas el la kunfandiĝo de du muzikstiloj kaj ritmoj venintaj el du kontinentoj, nome: Eŭropo kaj Afriko.

Joaquim Antônio da Silva Callado, flutisto kaj komponisto, estas konsiderata la patro de la "Ŝoristoj" kaj estis la plej populara muzikisto en Rio de Janeiro dum la imperia periodo. De li venas la unua referenco al la termino "Ŝoro" en la jaro 1870. Li komencis ludi fluton kaj pianon kun sia patro. Callado kreis la unuan grupon de "Ŝoro", komence kun du gitaroj, fluto kaj gitareto (cavaquinho). Li estas konsiderata la pioniro en la arto kunfandi eŭropajn kaj afrikajn muzikstilojn. Tiam, li kreis la unuan muzikan ensemblon, nomatan "Karioka Ŝoro" aŭ "Ŝoro de Callado". Callado estis amiko de Viriato Figueira da Silva, Ismael Correia, Lequinho kaj de la belga flutisto Matheus André Reichert, kiun D. Pedro II kontraktis por ĝojigi la balojn en la "Paço Imperial" en 1859. En 1879, Callado ricevis la plej altan omaĝon de la imperio: La Ordenon de la Rozo (A Ordem da Rosa). Unu jaron poste, la 20-an de marto 1880, li mortis pro cerba malsano.

Li estas konsiderata de la grandaj muzikistoj, kritikistoj kaj fakuloj en Brazilo kaj en la mondo, kiel la plej grava komponisto de la brazilaj tangoj kaj unu el la gravaj eksponentoj de la "Ŝoro". Ernesto Nazareth inspiriĝis en la rondoj de "Ŝoro" por krei komponaĵojn el forta originaleco en ritmo.

Maxixe, Lundu kaj aliaj afrikdevenaj ritmoj forte influis lian verkon, kvankam li ne multe agnoskis tion. Muzikisto el erudicia formado, la aŭtoro ne akceptadis la epiteton "populara" por siaj muzikoj, li preferis la nomon "brazila tango". La tangoj fariĝis la ĉefa trajto de la komponisto, kaj el tiuj, elstariĝas la muzikoj: ODEON kaj BREJEIRO.

Ernesto Nazareth komponis erudiciajn muzikojn ĝis hodiaŭ konsiderataj klasikaĵoj. Liaj muzikoj havas pli ol 100 jaroj, kaj ankoraŭ hodiaŭ estas multe ludataj. Laŭ Luiz Antônio de Almeida, "Ernesto Nazareth estas erudicia, sed kun ia popola spico".

Admiranto de Chopin, lia verko suferis influon de la pola komponisto, sed lia granda inspiro devenis el la simpleco kaj originaleco de la brazila socio. En 1932 komencis manifestiĝi en li mensaj problemoj, kaj pro tio oni sendis lin al psikiatria hospitalo.

En la unua de februaro 1934, li fuĝis de la frenezulejo kaj mortis, eble en la sama tago, droninta en la akvoj de iu digo en la bieno.

Pixinguinha

Muzikistoj, muzikologoj kaj admirantoj de nia muziko povas malakordi je unu aŭ alia afero. Sed, tamen, se estas iu nomo super ĉiuj aliaj individuaj preferoj, tiu nomo estas Pixinguinha. Iu iam diris "Se vi havas 15 volumojn por paroli pri la popola brazila muziko, estu certa, ke ne eblas tion fari, sed se vi havas spacon por skribi nur unu vorton, ne ĉio estos perdita, skribu rapide: Pixinguinha". Vinícius de Moraes iam diris, ke "se mi ne estus Vinícius, mi ŝatus esti Pixinguinha" En la 17-a de februaro de 1973, kiam Pixinguinha prepariĝis por bapto-meso en la preĝejo Nossa Senhora da Paz, en Ipanema, li suferis la duan kaj lastan korinfarkton.

Li naskiĝis en la 23-a de aprilo de 1897, kaj pro tio, tiu dato fariĝis la Nacia Tago de "Ŝoro".

Liaj verkoj estas internacie rekonataj: Carinhoso, Um a zero, Sofres Porque Queres ktp. Pixinguinha estas konsiderata la patro de la brazila muziko. La muzikisto ne nur estis virtuoza flutisto kaj saksoludanto, li ankaŭ estis genia komponisto, muzikmajstro kaj aranĝisto. Li komencis komponi la unuajn "Ŝorojn", valsojn kaj polkojn en unua jardeko de la pasinta jarcento.

Esploristoj de la MPB asertas, ke Alfredo da Rocha Vianna Filho, Pixinguinha, kreis la bazojn de la brazila muziko. Lia ĉefa kontribuo estis prilabori la komencantan muzikon, kiu ekaperis el la komponaĵoj de Ernesto Nazareth kaj Chiquinha Gonzaga, kiuj en la fino de la 19-a jarcento donis la unuajn akordojn al "Ŝoro", enmiksante la afrikajn ritmojn kune kun la eŭropaj stiloj, kiel schottisch, valso, minueto kaj, speciale, la polko.

Waldir Azevedo

En 27-a de januaro de 1923 naskiĝis, en Avenuo Suburbana, Rio de Janeiro, la muzikisto, kiu estis ne superebla en vendado de instrumentala disko en la historio de la Popola Brazila Muziko: Waldir Azevedo. Tre kompetenta ludanto de gitareto (cavaquinho), Waldir Azevedo havis tre singularan teknikon en la arto ludi tiun instrumenton, kiu estas limiga por esti instrumento por solo. Kaj danke al li, "cavaquinho" havas signifan gravon en la MPB, precipe en sambo.

La sukceso de Waldir Azevedo estis pro la fakto, ke li komponis muzikojn specife por la instrumento. Li ankaŭ komponis muzikojn, kiuj havas fortajn komunikeblecojn kun la publiko kiel "Pedacinho do Céu", "Vê se Gostas", "Brasileirinho", "Delicado" inter aliaj. Waldir Azevedo estis la unika artisto de "Ŝoro", kiu havis internacian rekonon. En 1957, li komponis la muzikon "Delicado", kiu havis rekordon en vendo kaj estis aŭdata en radio en la tuta lando, krome ĝi estis registrita en Usono kaj Eŭropo. Ludis ĝin, inter aliaj, Percy Faith, kaj Ray Conniff kaj multaj brazilaj kaj internaciaj instrumentistoj. Waldir Azevedo kun la Ŝoro "Brasileirinho" havis glorajn momentojn. Ĝin kantis Carmen Miranda, Ademilde Fonseca, filharmonio de Boston, Baby Consuelo, kaj aliaj brazilaj instrumentistoj.

Jacob do Bandolim

Jacob naskiĝis en la jaro 1918, en kvartalo Lapa. Kiam li havis 12 jarojn, gajnis de la patrino violonon, sed li ne sukcesis adaptiĝi al tiu instrumento kaj tuj ŝanĝis al mandolino.

Plej granda brazila referenco en la instrumento mandolino, kiu fariĝis parto de lia nomo. Jacob Pick Bittencourt, konata kiel Jacob do Bandolim, alportis la mandolinon al honora pozicio en la brazila muziko. Tiu laboro antaŭe disvolviĝadis per aliaj instrumentistoj, kiel Luperce Miranda, sed estis Jacob, kiu definitive enmetis la mandolinon, kiel solistan instrumenton. Lia unua mandolino estis napolitana modelo en la adoleskeco.

Kvankam li prezentiĝis ludante tre frue en instrumentaj ensembloj, li neniam profesiigis, ĉiam havanta aliajn laborojn ekster la muziko. Jacob estis vendisto, asekuristo, komercanto kaj polica notario, en tiu lasta li laboris ĝis la morto.

En 1969 Jacob ne rezistas al la 2a korinfarkto kaj mortas ĉe la pordo de sia domo. Li revenis el la domo de sia granda idolo (Pixinguinha). Lia filo, Sérgio Bittencourt, omaĝis lin per la fama sambo "Naquela Mesa".

En la 70-aj jaroj okazis la revivigo de "Ŝoro". En 1973, kuniĝis la Ŝoro-ensemblo "Época de Ouro" kaj "Paulinho da Viola" kaj ili ludis ĉe teatro João Caetano. Ankaŭ en tiu epoko, estis kreitaj diversaj kluboj de "Ŝoro" en Brasília, Recife, Porto Alegre, Belo Horizonte, Goiânia kaj São Paulo inter aliaj urboj. Ekaperis novaj ensembloj pri la ĝenro, kiel "Galo Preto" kaj "Os Carioquinas". Festivaloj pri Ŝoro, okazis en la jaro 1977. La TV-kanalo "Bandeirantes" realigis du eldonojn de la Nacia Festivalo pri Ŝoro kaj Kultur-Sekretario de Rio de Janeiro organizis konkurson pri Ŝoro-Ensembloj. Tiaj agoj havis reflektan, ĉar veteranoj en la arto ludi Ŝorojn, kiel Altamiro Carrilho denove reaperis al la publiko. Li estas viva legendo rilate al Ŝoro. Jam registrinta pli ol 100 diskojn, kaj prezentiĝis en pli ol 40 landoj, diskonigante tiun muzikon.

La 80aj jaroj estis dediĉitaj al multaj kursoj kaj seminarioj pri "Ŝoro". Gravaj instrumentistoj kunsidis por instrui kaj diskuti la ĝenron al la novaj generacioj. Ekde 1995 la Ŝoro ricevis apogon de diversaj ensembloj, kiuj sin dediĉis al disvastigado kaj modernigo kaj aperigo de KD-oj.

Ŝoro eniras en la tria jarcento, kun bagaĝo de pli ol 130 jaroj, krome, ĝi stariĝas kiel unu el la ĉefaj muzikaj ĝenroj en Brazilo. Estas miloj da registritaj diskoj kaj centoj da "Chorões" (Ploristoj), kiuj tenas tiun brazilan ritmon viva. La Ŝoro, krom esti riĉa kaj kompleksa muzika ĝenro ankaŭ estas fenomeno arteca, historia kaj socia.

Sed mankas disvastigado, ĉar dum la "NACIA TAGO ŜORO" estas festata en aliaj landoj, kiel Francio kaj Japanio, ĉi tie la plej multo de la brazilanoj ne scias, ke ekzistas tiu dato, kelkaj eĉ ne konas la ĝenron. Pri tio, Hermínio Bello de Carvalho diris "Kiam mi defendas la tezon, ke kulturo devus esti rigardata kiel materio pri nacia sekureco, mi pensas traduki la necesecon en la hodiaŭaj tagoj braziligi la brazilanon, laŭ Mário de Andrade".

Kreita per muzikistoj de Ŝoro en la jaro 2000 pro la neceseco transdoni siajn konojn al la novaj generacioj, la "Escola Portátil de Música" ekde tiam fariĝis unu el la ĉefa disvastiganto de "Ŝoro" en Brazilo. En la lernejo, oni povas lerni pri arto ludi "Ŝoro-n". Estas pli ol 23 instruistoj kaj ĉirkaŭ 600 lernantoj, kiuj ĉiusabate kunsidas ĉe la universitato Uni-Rio en kvartalo Urca. Rimarkinde pri tiu lernejo, estas ke ne nur brazilanoj lernas tie, sed ankaŭ alilandanoj venas Brazilon studi nian muzikan ĝenron.

ĈU VI PAROLAS *GLOBISH*?

Paulo S. Viana



Estas universala konsento, ke la mondo bezonas internacian lingvon – kaj ju pli teknologio progresas, des pli forte tiu bezono aperas. Estas ankaŭ konsento, ke lingvo internacia devas esti simpla, regula, fonetika, facile elparolebla por ĉiu homo kaj... neŭtrala. Multaj projektoj aperis de longa tempo, sed nur Esperanto fariĝis vera, vivanta lingvo. Tamen, la mondo hezitas akcepti Esperanton, pro sia sklaviĝo al ekonomiaj, politikaj interesoj. Tial, nuntempe la angla regas, malgraŭ ĝia evidenta maltaŭgeco.

Lastatempe aperis kurioza internacia projekto, kiun Esperantistoj devus atenti, ĉar ĝi provizas fortajn argumentojn favore al Esperanto. Temas pri *globish*. Kio estas *globish*?

La neologismo konsistas el kunigo de *global english*, kaj lanĉis ĝin franca eksfunkciulo de IBM, Jean-Paul Nerrière, en la jaro 2004. Ĉi tiu rimarkis, ke homoj, kies denaska lingvo ne estas la angla, parolas pli facile kun alilingvanoj ol kun angle-parolantoj... uzante simpligitan formon de la angla! Laŭ Nerrière, “la bunta frazeologio kaj komplika gramatiko [de la angla] faras ĝin nekomprenbla”. Krome, “se ĉiuj parolus simple, egale, tiam neniu aspektus arogante”. Li pledis, ke “ĉiujn kulturlingvojn en la mondo oni gardu” kaj uzu *globish* por la internaciaj kontaktoj en la mondo de negocoj kaj ekonomio. Li do kreis simpligitan formon de la angla lingvo, kun 1500 vortoj, simpligitaj gramatiko kaj sintakso. Oni uzas nur mallongajn frazojn, kun helpo de multaj gestoj! Ekzemple, en *globish* la esprimo *my nephew* (mia nevo) tradukiĝas per *the son of my brother* (la filo de mia frato). Ne permesate estas uzi internacie nekomprenblajn ŝercojn kaj idiotismojn. Ĝi celas specife la mondon de entreprenistoj kaj financistoj kaj kvankam ĝi aspektas kiel tute “normala” angla lingvo, tamen ĝi estas nur komuna tereno por faciligo al homoj, kiuj ne parolas la anglan denaske. Kurioza afero, kiu vekis kritikojn, estas tio, ke Nerrière registris la lingvon *globish* kiel sian propraĵon – komparu kun la sinteno de Zamenhof rilate Esperanton! Tiu detalo starigis ankaŭ la

kritikon, ke la ideo pri *globish* klare aperas kiel manifestiĝo de kultura imperiismo. Finfine, nur 4-5% el la homoj sur la Tero estas denaskaj parolantoj de la angla lingvo.

Kial mi asertas, ke *globish* estas forta argumento por Esperanto? Memkompreneble, ĉar ĝi klare indikas, 1-e: ke urĝe necesas solvi la lingvan problemon en la mondo, kaj 2-e: ke la angla ne taŭgas! Krome, ne necesas argumenti, ke *globish* ne solvas la problemon! Kiel ironie komentis la ĵurnalo *The Times*: "... ni devus lerni la francan por Molière, la italan por Dante, la germanan por Goethe, la hispanan por Cervantes, la anglan por Shakespeare, kaj *globish* por diskuti pri la prezo de fero en Ĉinujo".

Fakte, *globish* ne estas novaĵo. En la jaro 1930, Charles Kay Ogden lanĉis *Basic English*, kun proksimume la samaj principoj: 1000 ĝis 2000 vortoj kaj simpligita gramatiko. Tiam oni interpretis la vorton *basic* kiel *british american scientific international commercial* ! Ĝia imperiisma karaktero estis tiel klara, ke la fama verkisto George Orwell inspiriĝis je tio por inventi la fikcian lingvon *Newspeak*, en sia konata romano "1984" – taŭgan por diktatora reĝimo, en kiu la vortaro ĉiam malkreskas, kaj la vorto "libereco" estas malpermesata.

Alia kurioza dialekto de la angla lingvo, kiu montras ĝian maltaŭgecon estas *Engrish*. Kreita en orientaj landoj, kie la homoj malfacile distingas inter la sonoj R kaj L, oni uzas kripligitan formon de la angla por popularaj kanzonoj, ŝildoj, sciigoj, restoraciaj menuoj, televidprogramoj, kaj simile.

Aliflanke, ni ne forgesu la movadon favore al *Anglish (Saxon English)*, kiu estas la angla lingvo de puristoj, kiuj emas uzi nur ĝermandevenajn, anglesaksajn radikojn kaj eviti vortojn el greka kaj latina deveno.

Kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konvinkiĝis pri la Babelo en la anglalingva kampo, ni laste memorigu: ekzistas ankoraŭ unu kroma versio de *globish*. Temas pri Gogate-*globish*. En la jaro 1998, la hinda inĝeniero Makhubar Gogate, kreis sian propran dialekton de la angla, kun la ĉefa celo faciligi la ortografion kaj prononcadon. Jen kelkaj ekzemploj: *color / colour* fariĝas *kalar*, *he is fine* (*hee is faain*), *two cats went to city* (*too kaets went tu siti*), *eat it quickly* (*eet it kwikli*), *do you know were the library is?* (*du yu no uear dha laaybrati iz?*), *the world wants peace and prosperity* (*dha world waunts pis aend prausperiti*). Ĉu eblas pli klara pruvo, ke la angla lingvo estas tre malfacila?

Nu! Esperanto estas preta, elprovita, aprobita, funkcianta nenies propraĵo. Kiam *homo sapiens* fine akceptos ĝin, anstataŭ plu kaj plu klopodi groteske akrobati?

Kie Sylla Chaves?

Jorge das Neves

Poetoj ne forpasas! Poezio
ne putras, kiel putras ja kompoto...
Daŭras SYLLA en la Akademio:
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

Samideano klera, patrioto
kara majstro pri vorto, gramatiko
la lasta opinio pri radiko
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

Ne manku tie ĉi sincera noto:
vortaristo en plena evoluo
en la Movado restas li guroo
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

Admiralo de nia Verda Floto
pro merito kaj laŭ reputacio
en la praktiko kaj en teorio,
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

Li venkas, ne necesas la baloto,
en la listo li estas mem la kapo,
ne sacerdoto, tamen nia papo,
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

Poetoj ne forpasas! Poezio
ne putras, kiel putras ja kompoto...
Daŭras SYLLA en la Akademio:
SYLLA CHAVES: poeto, poligloto.

(Ĉi tiu poeziaĵo estis verkita de s-ano Jorge das Neves tuj post la forpaso de Sylla Chaves)

ĈIRKAŬAĴO DE LA ĈI-JARA KONGRESURBO ATENDAS MALKOVRON

– A FRASE ACIMA É DIFÍCIL PARA VOCÊ?

1 - **INTRODUÇÃO** – A frase acima apareceu como uma espécie de “manchete” (ou “chamada”) na capa da revista “Esperanto” (da UEA), de jul-ago. de 2003. Essa frase refere-se à cidade de Vilnius, na Lituânia, onde se realizaria, na época, mais um Congresso Universal de Esperanto. Mostrei essa frase, na capa da revista a alguns dos meus alunos que já tinham alguns anos de estudo de Esperanto. E, como eu já esperava, nem todos a entenderam de imediato, logo “à primeira vista”... Isso aconteceu, provavelmente, porque se trata de uma frase cheia de palavras “não-simples”, ou seja, cheia de palavras que poderíamos chamar de “aglutinantes”, isto é, formadas por meio de prefixos, sufixos e/ou em forma de “palavras compostas”. Para os alunos menos preparados para a feição “aglutinante” de várias palavras do Esperanto, só depois de bastante “análise” de cada palavra conseguiriam “decifrar” os vários “enigmas” daquela frase. Talvez só um tanto penosamente, descobririam o sentido de cada uma daquelas palavras. Ou seja: ĈIRKAŬAĴO – arredores; ĈI-JARA – deste ano; KONGRESURBO – cidade do congresso; ATENDI – esperar (= aguardar); MALKOVRO – descoberta... Depois dessa “análise” de cada palavra, finalmente o aluno poderia descobrir o sentido da frase: – “Os arredores da cidade do congresso deste ano aguardam a descoberta” (ou: ... aguardam serem descobertos).

2 - **COMO DOMINAR A “AGLUTINAÇÃO” DO ESPERANTO?** – Essa tarefa não é tão difícil como talvez pareça – mas, no começo, é um tanto “trabalhosa”, exigindo bastante raciocínio e dedicação... Mas, em pouco tempo, o aluno começará a dominar melhor a “aglutinação”, passando a raciocinar “diretamente” em Esperanto... Experimente ler textos mais “avançados” em boas revistas e livros em Esperanto – e logo você começará a descobrir que o que era trabalhoso fica cada vez mais fácil... E essa leitura “avançada” se transformará em uma gratificante “aventura linguística”.

NOTA — Para compreender melhor este assunto, leia o estudo intitulado “A aglutinação do Esperanto”, no livro “La Konversacia Klubo” (Curso de Aperfeiçoamento), págs. 84 a 86. Se você ainda não tem esse livro, peça-o à nossa Cooperativa (esperanto.kke@gmail.com). Preço: R\$ 12,00.



Alvaro Motta prelegas pri Braille



Célio Freitas Martins parolas pri la pola lingvo



Francisco Wechsler prelegas pri retmesaĝoj